

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731F, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 pencoj

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 70 (Sixth Year)

Melburno (Melbourne), Australio.

10 aprilo 1926

ISOLATED ESPERANTISTS AND A. E. A.

At the annual meeting of the Victorian Branch of the A.E.A., Mr. H. Byatt, speaking to a motion providing for the establishment of a capital fund, said:—The objects of the Association include: 1, circulation of information among all classes by means of leaflets, literature, magazines, etc.; 2, broadcasting lectures and talks in Esperanto; 3, organising addresses and demonstrations in local centres; 4, promoting instruction and the use of Esperanto in schools, universities, commerce, science and literature, in every way as opportunity offers. What the Universal Esperanto Association is to the world so are the various national Esperanto associations to each individual nation. In order to provide a working fund to assist in carrying out those objects the A.E.A. permits the enrolment of individual members, in addition to group membership. This is similar to the method adopted by the British Esperanto Association. It is hoped by this to raise sufficient funds to carry on a continuous system of publicity for Esperanto. The yearly subscription is 10/- for full members and 5/- for associate members. An associate member is: a, a person who resides more than ten miles from Melbourne; b, a person who is already a member of a group affiliated

with the A.E.A. Full members receive the "Suda Kruco" (free), the official organ of the movement in Australasia.

Mr. P. Hudson was elected secretary, to whom all applications for membership should be made, c/o Box 731F, G.P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

ESPERANTO AND THE FRANKFORT FAIRS.

This Fair employs Esperanto for many publications and has recently obtained further proof of the success of its Esperanto propaganda. After the despatch of its last Esperanto prospectus, it received 130 newspaper cuttings in 18 languages, from 21 countries in 4 continents.

The literature of the Fair is now sent to 80 countries in various parts of the world. Esperanto occupies the fourth place among the foreign languages employed. The catalogue contains a comprehensive list of goods in Esperanto. The official organ regularly publishes articles in Esperanto.

ORIENTO.

100-Paga revuo esperanta pri landoj de Azio. Multilustrita. Kunlaboras azianoj. Abonu ĉe I. Ŝeriŝev, G.P.O. Sydney. Redaktoro estas I. Ŝeriŝev; eldonas "Esperanta Eldona Kio. Oriento." Prezo de unu numero 2/-. Aperis numeroj 1 kaj 2.

AŬSTRALIAJ INDIGENOJ ĈE GROOTE EYLANDT MISIO.

Inter la multaj personoj laborantaj sub la direkto de la Eklezia Misia Societo, (Church Missionary Society), kiu nun festas ĝian centjaron en Aŭstralio, neniu estas pli izolaj, ol tiuj viroj kaj virinoj, kiuj laboras en la misio de la societo en Groote Eylandt, en la Golfo de Carpentaria. Pastro H. E. Warren, ĉefestro de la misio en Nordo Aŭstralio, nun, (fino de jaro 1925), vizitas Melburnon. Li venis por helpi ĉe la ekspozicio okazonta en Wirths Olimpia en la proksima semajno.

S-ro Warren lernis la inĝenieran profesion. Poste li studis por eniri la pastraron. Pastriginte li proponis sin por eduka, industria kaj spirita laboro inter la indiĝenoj en la nordo de Aŭstralio. Tiel laborinte dek du jaron li konvinkigis, ke la vera Aŭstralio indiĝeno estas lerta, inteligenta, kapabla, kaj havas povon kaj volon por lerni. En sia sovaĝa stato la indiĝeno faras multajn aferojn, kiuj postulas pripensadon kaj lertecon. Per grandega peno li konstruas kanoton el granda arbo, kaj per fajro kaj akvo tiel hardas ĝin, ke ĝi ne kreviĝos. Li ornamas ĝin per komplikaj figuraĵoj kaj desegnoj kaj fieras pri ĝi, kiel fierus blanka knabo pri nova aŭtomobilo. Tamen, se blankulo deziras ĝin, li volonte fordonas ĝin al tiu interŝanĝe por kio ajn proponata, absolute fidante al la honesto de la blankulo. Liaj lancoj estas artaĵoj, faritaj laŭ malsamaj desegnoj, ĉiuj el kiuj bezonas lertecon en la farado kaj iuj ankaŭ longan praktikon. Oni neniam vidas malbone faritan lancon en la mano de indiĝeno. Uzante du ŝtonojn kiel martelon kaj amboson, li faras tre utilan poŝtranĉilon el kvarcola najlo, kaj uzas ĝin egale facile aŭ por fari lancon aŭ distranĉi helonion. Ankoraŭ restas en Aŭstralio kelkmiiloj de tiuj indiĝenoj kaj S-ro Warren loĝis inter ili en Norda Teritorio kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Groote Eylandt estas unu el la malmultaj ankoraŭ ne travojaĝitaj insuloj en la mondo Holandanoj eltrovis ĝin en la dekseca jarcento kaj nomis ĝin Groote aŭ Granda insulo pro tio, ke ĝi estas la plej granda el la multaj insuloj apud la norde de Aŭstralio. Dum multaj jarcentoj Malajoj vizitadis ĝin serĉante trepangon. Tamarindaj arboj ankoraŭ kreskas, kaj oni povas vidi la restaĵojn de la kabanaroj ĉie,

kie la Malajoj fiŝkaptadis.

Pro la cirkonstanco, ke ĝi estas lokita en la granda kaj ofta ventegvizitata golfo Carpentaria, apud Arnheim's land, Groote Eylandt ankoraŭ ne estas loĝata krom de kelkcentoj da indiĝenoj kaj la homoj en la misio de "Church Missionary Society." Ĝi estas 700 mejlojn malproksime de Darwin, 400 de Thursday Island, (elp. torzde ajland-Insulo Jaŭdo), Norman-ton kaj Burketown. Estas kredeble, ke ĝi estas la plej izola misiloko en la mondo. Ŝipoj ne regule iras tien kaj neniam poŝtaĵoj estas liverataj. Kiuj volas ricevi aŭ sendi leterojn, tiuj devas mem aranĝi kiamaniere tiel fari. La dumasta velŝipeto apartenanta al la misio veturas du—tri fojojn ĉiujare al Thursday Island por poŝtaĵoj kaj provizaĵoj. S-ro Warren kaj aliaj tre esperas ke iu donacos senfadenan telegrafan ekipaĵon al la misio.

La insulo havas areon de preskaŭ 1000 kvadrataj mejloj. Granda parto de ĝi estas el kvarca roko. Ĝi estas tre alta en la mezo, kie unu montsupro nomata Monto Ellis sin levas 600 futojn. La tieaj montetoj estas la hejmo de multaj valabioj, (speco de malgranda kangaruo), igvanoj, histrikoj, grandaj serpentoj kaj pteropoj kaj estas la ĉasloko de la indiĝenoj en certaj sezonoj de la jaro.

Malantaŭ la marbordo estas multo de grandarba tero. Pli malantaŭe troviĝas majestaj palmoj kaj filikoj, kie en marĉoj kreskas la tiel nomataj "paperŝelaj" arboj barantaj eniron al la suno. Pecoj de bona, plugibla, tero troviĝas apud la riveretoj, kaj ĉie estas sensala akvo.

Birdoj ne estas tiel multaj, kiel oni povus supozi, ĉar antaŭ du jaroj detrua ciklono mortigis milojn el ili. De fiŝoj troviĝas neelĉerpebla provizo ambaŭ en la riveroj kaj en la maro. La indiĝenoj estas belstaturaj, fortikaj, sanaj specimenoj de veraj indiĝenoj al kiu civilizado ankoraŭ ne venis por difekti ilin.

La viroj ĉiam estas nudaj kaj preskaŭ ĉiuj havas longan pintan barbon. La virinoj portadas faldeblan platon el arboŝelo per kiu iafoje sin kovri. Malsaneco estas malofta inter ili kaj ekzistas tre malmultaj specoj de malsanoj. Vizitanto en la insulo vidas de proksimo nur la maljunulojn kaj militistojn ĉar la knaboj devas resti malproksime kaj la virinoj neniam aperas.

La leĝoj pri moraloj estas precizaj kaj severe observataj kaj mortigo estas la puno por malobeo. En iaj okazoj la akuzito havas la privilegion submeti sin al Dia juĝo, en kiu okazo la demando ĉu li estas kulpa aŭ nekulpa determiniĝis laŭ lia sukceso aŭ malsukceso eviti pikojn de lancoj ĵetataj al li el difinita distanco.

En tiu provo la indiĝenoj estas tute honestaj kaj malpermesas ĉian maljustaĵon. Church Missionary Society komencis labori sur la insulo antaŭ kelke da jaroj kaj nun estas tie prospera misio kiu instruas 50 geknabojn disvolvi siajn naturajn talentojn kaj legi, skribi, mastrumi, ĝardeni kaj tiel plu.

Kristanaj viroj kaj virinoj instruas al ili praktikan kristanismon. S-ro Warren diras, ke nenio malhelpas, ke multe pli el tiaj indiĝenoj el la Norda parto de Aŭstralio ricevu tian instruadon kaj en la proksima estonteco, fariĝu utilaj membroj de la Aŭstralia Komunumo.

(El la angla, tradukis Karlo Madrigalo).

ESPERANTO AND TECHNICAL SCIENCE.

The German Union of Technical-scientific Associations, which comprises the most important bodies in this department, is greatly interested in Esperanto and sent its administrative director to the last Universal Esperanto Congress. Its official organ "Engineering Progress" which issues editions in English and Spanish contains in each number a special column in Esperanto. The Union is endeavouring to make use of the means of intercommunication furnished by the Esperanto movement for strengthening its relations with foreign countries.—I.E.S.

ESPERANTO AND LITERATURE.

Esperanto literature, which now comprises more than 5000 volumes, has been notably enriched by the appearance of the "Kataluna Antologio," in a luxurious edition of more than 500 pages. The object of this publication is to make known to the numerous Esperanto public in other countries the treasures of Catalonian literature.—I.E.S.

LA TIGRO KAJ LA VULPOJ.

Iam vulpo kaj lia edzino estis revenanta hejmen al sia kavo.

Ili estis ne malproksime de la hejmo, kiam ili renkontis grandan tigron. Li tigro estis tre malsata, ĉar, kvankam li ĉasis dum la tuta nokto, li nenion kaptis. Vidante la vulpojn li lekis la makzelojn kaj murmuregis kaj komencis vipsvingi la voston.

Kompatinda sinjoro Vulpo tiel konsterniĝis, ke li preskaŭ perdis la prudenton kaj nenion povis fari. Sinjorino Vulpo ankaŭ estis terure timigita, sed ŝi pripensis pri la kvin vupidoj en la kavo, kaj, pro ili, ŝi ne volis esti formangita se ŝi nur povus eviti tion.

—Sinjoro—ŝi diris al la tigro—mi ĝojas vidi vin. Mia edzo kaj mi havis disputon, kaj vi, kiu estas tre saĝa kaj sperta, nepre povos decidi tion por ni. Tre plaĉis al la stulta tigro aŭdi sin tiel laŭdata. Kun, dolĉa rideto li respondis.—Eble mi povos. Pri kio sinjoro Vulpo kaj vi malkonsentis?—Sinjoro Vulpo kaj mi decidis, ke ni ne plu povos vivi kune—sinjorino vulpo respondis.—Tio estas facile aranĝita, sed ni ne povas interkonsenti, kiamaniere dividi la infanojn.

—Kiom da infanoj vi havas?—la tigro demandis.

—Kvin, via moŝto—fiere respondis sinjorino Vulpo. —Kvin tiel belkreskajn infanojn, kiel vi povus deziri vidi.

La tigro ĝojegis. Li havos ne nur sinjoro kaj sinjorino Vulpo, sed ankaŭ, se li estus lerta, la kvin vulpidojn por sia matenmango.

—Kaj kiel vi proponas dividi ilin? li demandis.

—Jen la demando mem, pri kiu la edzo kaj mi ne povas interkonsenti—diris sinjorino Vulpo. —Li insiste volas preni tri el ili, lasonte al mi nur du, sed ili estas tiaj karuloj, ke mi ne povas senigi min de tiom. Mi estas la patrino; mi opinias, ke mi devas havi tri. Kiel ŝajnas al vi?

—Tio ja estas malfacila demando—la tigro diris konsente. —Estas bedaŭro, ke ne troviĝas aŭ kvar aŭ ses; tiuokaze ili povas esti tre facile dividitaj. Tamen, se mi povus vidi ilin, eble mi pli facile povus juĝi.

Ekiris do sinjoro kaj sinjorino Vulpo kaj la nobela tigro, kiu apenaŭ povis kaŝi rideton, kiu ludis ĉirkaŭ

lia buŝo. Sinjoro Vulpo jam nun re-kolektis siajn pensojn, kaj li diris argumente:—Ili ne povas vivi sen la patro. Mi provizas ilin per la nutrado. Mi estas certa, ke vi difinos tri al mi.

Ili baldaŭ alvenis la vulpan nestegon. Ĝi estis kaveto en la rokoj. La enirejo estis malgranda, sed la nestego estis seka kaj varma kaj mola kaj komforta, ĝuste tia hejmo, kian vulpoj amas.

—Kaj nun, sinjoro Vulpo,—ordonis al li la edzino —eniru kaj elkonduku la infanojn. Sen perdo de tempo sinjoro Vulpo malaperis tra la enirejo.

—Vi devas vesti ilin tre zorge—sinjorino Vulpo postkriis al sia edzo. —Neniel povus esti, ke ni prezentu ilin, krom en sia plej bona vestaĵo, al iu tiel distingita, kiel lia mosto.

Dum longa tempo sinjorino Vulpo kaj la tigro atendis. La tigro fariĝis senpacienca. —Ĉu li neniam venos! — Li grumbliis.

—Paciencon: via mosto. Sendube la edzo estas ĝenata kun la infanoj; li ne estas tiel sperta pri la vestado, kiel mi. Sed ankoraŭ ne venis sinjoro Vulpo. La tigro fariĝis ĉiam pli kaj pli senpacienca; fakte li ek-koleriĝis.

—Kio povas deteni lin! — ekkriis sinjorino Vulpo. —Mi eniros por helpi lin. Mi tre deziras, ke vi vidu la infanojn, ĉar mi estas certa, ke via decido estos favora al mi.

Kaj sinjorino Vulpo komencis malrapide sin enŝovi dorsdirekte tra la mallarĝa enirejo. —Kiel vi eniras dorsdirekte? demandis la mirigita tigro.

—Ĉu mi estas tiel malklera — ekkriis sinjorino Vulpo —ke mi malhonorus min? Ĉu ne estas konvene ne forturni la vizaĝon antaŭ sinjoro tiel granda, kiel vi?

Fine ŝi estis ekster danĝero en la kavo. —Mi tre dankas al vi pro via vizito,— sinjorino Vulpo tiam diris dolĉe, —sed mia edzo kaj mi jam nun decidigis, ke ni ne disiĝos; tial ni ne devos dividi la infanojn malgraŭ ĉio. Tamen estis tre afable viaparte, fari tiun komplezon. Kion kolera tigro povis fari?

Li ne povis enrampi en la kavon post ili. Kaj tiun tagon, escepte se li pli bone sukcesis aliloke, li devis dormi malsata.

El la angla tradukis; S. Trewin.

KRONIKO.

—
SYDNEY. — Semajna gazeto "Humour" represas multajn ŝercojn el la nova germana ĵurnalo "Ridanta Esperantisto."

Granda magazeno, Farmer & Co. Ltd., reklamas la esperantajn gramofondiskojn en tagĵurnaloj.

Kvar klasoj ricevas regulan instruadon ĉe la "Sydney Esperanto Society," post kiu la sekvantaj eroj estis donitaj dum la monato:—

Marto 4—"Lingvaj kuriozaĵoj" sur nigra tabulo, de S'ro A. Auwart.

Marto 11—Parolado pri la ĵus okazintaj teruraj Viktoriaj arbarbrulegoj, de F'ino. K. Anderson.

Marto 18—"Nacioj de l'mondo," parolado de S'ro D. Healy.

Marto 25—Socia vespero, kiun ĉeestis multaj membroj de la "Workers' Educational Association" (Laborista Eduka Asocio). Krom kantoj, deklamadoj kaj malgranda teatraĵo, la societa sekretario donis specialan elmontrandon de kelkaj "Linguaphone" fonografdiskoj. Ĉu pro malbona enpakado aŭ difekta presado de la diskoj, la surfaca bruado dum ludado de "Elparolado" kaj "Stilo" preskaŭ superis la voĉon de D'ro Privat. La aliaj ("Zamenhof pri Homaro" kaj "Poezio" ambaŭ duflanke) estis pli bonaj, kvankam la nadla gratado estas pli granda, ol en ordinaraĵ usonaj aŭ anglaj diskoj. Pri la parolanto kaj la temoj oni nur povas paroli en entuziasmegaj frazoj kaj tiu faras la alian malagrablaĵon des pli ĉagreniga. Eksportantoj devas memori, ke tiuj diskoj devas trapasi la tropikojn kaj malbona enpakado povas kaŭzi ruiniĝon. Eble la supraj diskoj suferis dumvojaĝe, ĉar la fonografaparato estis perfekta.

Ni estis petataj represi la unuan paragrafon aperinta en lastmonata kroniko, kiu estis bedaŭrinde fuŝita de nia neesperantista presisto:—

"Radio," el sama eldonejo kiel "Wireless Weekly," montras similan intereson en Esperanto, kiel ĝia fratina ĵurnalo. Ofte oni legas "Esperantajn Notojn" pritraktantaj la progreson de nia lingvo inter radiantoj, kaj laŭ sciigo de la redaktoro, konstanta fako en ĉiu numero baldaŭ fariĝos.

MELBURN, V. — Dum la pasintaj semajnoj la programo de la Melburna Esperanto Societo, enhavis kelkajn tre interesajn erojn. Sino.

Bigelow donis bonan lecionon pri la anglaj idiomoj, kaj la traduko de ili, Esperanten, donis okazon montri ĉies kapablecon. Sro. P. Hudson de nove interesigis la anojn pri siaj vojaĝadoj, kaj klare rakontis pri parto de siaj spertoj en Suda Ameriko. Li vizitis multajn el la ĉefaj urbegoj, kaj parolis pri iliaj mirindaĵoj, la grandaj riveroj, la havenoj, kaj la moroj de la popolo.

AS BAD AS THIS?

A man took home a booklet on Esperanto and, during a meal, a guest regaled the party with extracts pronounced according to the instructions supplied.

At last there came a strange-sounding word, evidently pronounced with great difficulty.

"Is that really Esperanto?" asked the host, innocently.

"No," was the reply, "a fishbone."

ESPERANTAJ GRAMOFONDISKOJ. "LINGUAPHONE"

1. SERIO LITERATURA KAJ ORATORA.

Kvin diskaj du-flankaj kun enhavo el la
PAROLADOJ, PROZO, KAJ POEZIO

de
D-ro L. L. ZAMENHOF kaj
D-ro EDMOND PRIVAT.

Kun ĉiu diskaro estas sendata foliaro kun la presita teksto de la paroladoj, poemoj k.t.p.

2. SERIO INSTRUA.

Dek kvin du-flankaj diskaj. Prezantas kompletan kurson de Esperanto en tridek lecionoj. Ĉiu leciono konsistas el serio de praktikaj frazoj pri iu afero de la ĉiutaga vivo kaj specimena interparolo pri la sama temo. Belega lernolibro akompanas ĉiun diskaron. En ĝi troviĝas apud la teksto de la lecionoj, tridek bildoj kun responda enhavo kaj seslingva vortaro. La lernolibro estas aparte havebla, kiel ankaŭ pli grandaj bildoj por uzado ĉe kursoj.

Ĉiuj Esperantaj diskaj parolitaj de D-ro Edmond Privat. Tiu fakto garantias la purecon de la elparolo.

Similaj kursoj estas preparitaj en la lingvoj
ANGLA, FRANCA, GERMANA, HISPANA, ITALA,
AFRIKHOLANDA.

Pri prezoj kaj pagokondiĉoj sin turni
al la

Tutmonda Disvenda Agentejo
THE ESPERANTO INSTITUTE LIMITED,
WELWYN GARDEN CITY, HERTS, ANGLUJO.

Kun ĉiu diskaro estas sendata foliaro kun la presita teksto de la

HAROLD PUDNEY

Specialisto pri Fontanplumoj.

Se vi havas kriplan fontanplumon, kiu malhelpas vian skribadon portu ĝin al li, kaj li malkare rebonigos ĝin. Aŭ ĉu vi deziras fontanplumon POR VI MEM AŬ POR VIA AMIKO? Li havas multajn el ĉiu speco, je prezo facila por via monujo. Li speciale prizorgas mendojn per poŝto. Memoru la adreson

7 EQUITABLE PLACE, MELBOURNE

A.E.A. ANNUAL MEETING.

The annual meeting of the Victorian section of the A.E.A. took place at the club-room of the Melbourne Esperanto Society (Public Benefit Bootery Building, 5th floor, 323-325 Bourke St.) on the 5th March. Mr. H. Byatt occupied the chair. It was decided that the branch support the proposals of the Hobart Branch re the next Australasian Esperanto Congress, which is to take place at Hobart during Easter week of 1927.

It was suggested that a Congress Secretary be appointed in each State to collect the Congress fee of 2/6 and keep in touch with the Congress Secretary at Hobart. Mrs. E. S. Bigelow was appointed secretary for Victoria, and asks all Victorian Esperantists to send their congress fees either through their Club Secretary, or direct to her, as early as possible.

Mr. R. Rawson reported that he had not received a receipt for affiliation fees sent to K. R., although he had three times written for same.

Mr. H. Byatt read a detailed proposal re the linking up of all isolated Esperantists with the A.E.A. Mr. P. Hudson moved, and Miss V. Cox seconded: That proposal submitted be accepted, and that Mr. Byatt be authorised to send a circular letter to all known isolated Esperantists. Particulars of this proposal are to be found elsewhere in this edition.

Mr. Rawson having intimated that he did not desire to continue as Secretary, Mr. Hudson consented to accept the position. Mr. H. Byatt was elected President of the Victorian Branch.

RADIO.

On March 6th, 3LO transmitted a talk on Esperanto Literature by Mr. R. Rawson, who was supported by Miss Shirley Dumbrell. Mr. Rawson gave a most interesting address and ably described the rise of Esperanto literature from its birth to the present time. Shirley Dumbrell, who is 12 years of age, gave an admirable rendering of "Excelsior," as well as some lines by Schiller. 3LO merits complimentary notice for their enterprise in broadcasting esperanto items which undoubtedly give pleasure to thousands of Esperantists and students throughout Australia.

FORJETU "JAPAN" ON ALVOKO
AL LA TUTMONDAJ
ESPERANTISTOJ.

Per ĉisupra titolo mi antaŭ ĉio devas atentigi al la legantaro, ke mi ne deziras, ke oni forjetu "Japano" on, sed "Japan" on, t.e. uzu la veran nomon "Nippon" por nia lando anstataŭ "Japan" la falsa.

Koncerne tion mi jam prezentis proponon al Esperantista Akademio petante, ke ĝi prozorgu oficialigi la nomon "Nippon," ĉar tiu rimedo estos plej efika por konvinki la tutan mondon.

La kaŭzo estas jene:—

Malgraŭ la nomo "Japan" aŭ la simila fariĝas nun preskaŭ internacia, tia elparolado neniam ekzistis en nia historio.

Nia lando estis por la unua fojo konigita al la okcidentuloj, diras historio, pere de Marco Polo en la 13a jarcento sub la nomo "Zipangu."

Ĝi estas, mi opinias, la tiama (hina elparolado iel difektita, kiun oni nun elparolas Pekin—maniere "Jih-pen-kuo" (etimologie la lando, de kie venas la suno).

La nomo "Japan" do devas esti deveninta de tiu "Zipangu" duoble difektite; ni tamen vole-ne-vole elparolas tiel, nur por ke la fremduloj povu kompreni, sed neniam hejme.

Ekzistis en fakto kelkaj historiaj nomoj propraj al nia lando, kiujn ni ankoraŭ nun uzas nur beletristike, sed la nomo "Nippon" estas tiu oficialigita de nia registro en la jaro 670a p.k., kaj de tiam ni uzadas ambaŭ politike kaj geografie.

Unuvorte la nomo "Japan" estas al ni stranga, nekonvena, eĉ sonante kvazaŭ jargono, kiun anstataŭigi per la vera nomo ni pretendas kiel la natura inkino de ia homoj.

Kiel ajn oni nomu landon de ekstere, tion neniu rajtas riproĉi kiel "sintrudema en la internan vivon" aŭ "elpuŝo de la ekzistanta lingvo nacia," sed ĉu ne estas prudente kaj en ia senco konforme al la bulonja deklaro, se oni preferas la nomon, kiun solan la popolo koncarnanta uzadas jam de kelkaj centjaroj kiel sian propran, ol tiun, kies deveno estas dubinda?

K. Takahaŝ, Del. U.E.A.
18/1/1926.

Mizuoĉi, 1-28, Ŝizuoka, Nipponujo.

TELEPHONE CUSTOMS FOR TRAVELLING ESPERANTISTS.

Telephone usage varies greatly, depending upon local customs and conditions. From several sources has been gathered the following information which may prove useful to travellers.

In Abyssinia no one is allowed to use the telephone directly. All messages must be written out and given to the operator, who shouts them into the transmitter at the top of his voice, to the edification of all within hearing.

In Japan, most of the operators, or Moshi-moshi, as they are called, are young girls, the average age being 14. Telephones with low numbers get the more experienced girls and better service than those with high numbers. Rights to telephone numbers, especially low ones, are frequently purchased by those desiring service and unwilling to wait perhaps years for the Government to furnish service.

In Turkey, the work is done by Greeks, Armenians, Jewesses and other races. As there are three Sabbaths observed in each week by Mohammedan, Jew and Christian respectively, there is little telephone traffic on Fridays, Saturdays or Sundays.

In India, most of the women operators are Eurasians, or mixed European and native stock, though many operators are men.

In England, an operator is called a "Telephonist."

In Russia, it is a penal offence to call them anything but "Comrade" or "Citizeness."

In Japan, on answering a call, the operator says, "Moshi-moshi," which is the equivalent of "Hello."

In England, "Are you there?"

In France, "I'm listening."

In Germany, "Here's the exchange."

In Norway, "Central" or "Yes."

In Sweden, the operator simply gives her number, as "40."

In Belgium, on completing the call, the operator says, "Talk."

In Sweden, "Please begin."

In Norway, "Clear."

In England, the "Telephonist" says "You're through," meaning you are connected "through" to your "party" and may begin to talk. An American thus addressed replied "Why I haven't begun yet."

—el Amerika Esperantisto.

18th UNIVERSAL ESPERANTO CONGRESS.

Edinburgh, 31 July to 7 Augusto.

Bulletin No. 2-a dated 30th January 1926, informs us that the congress following the procedure of last year at Geneva is to take the form of a Summer University, during which the following well known speakers will be heard:—**Folklore and Folk-song**, France: Pro. Th. Cart; Germany: Paul Bennemann; Poland: S. Grenkamp-Kornfeld; Romania: Andreo Ĉe; and Dr. Immanuel Olšvanger. **Linguistics**: Pro. W. E. Collinson, Liverpool (Esperanto as a way to the Language Science). **Medicine**: Pro. Odo Bujwid, Jagelona University, Krakow, (Mankind and Microbes); Dr. Pascal Deuel, Leipzig (1 Modern successes in the medical treatment of consumption); 2 Human longevity). **Science**: Dr. E. E. Fournier D'Albe, theme to be announced later. Rinaldo Orenco, previously of the Astronomical Observatory of Florence (The Sun)—two speeches. Dr. Alfredo Strosoli, Pisa, (Electro-metallurgy in Italy). **International Labour Office** of the League of Nations: C. C. Tarelli, official delegate to the Congress will make two speeches (1 Constitution and aims); (2 Labour and Results).

The Duke of Connaught has kindly consented to be Patron to the Congress, and among other notable people are the Mayor of Edinburgh, and other towns, famous Educationists, Members of Parliament, etc.

Up to the 30th January, 176 members had sent in their Congress Fee. We are otherwise informed that Australasia will be represented (Red).

GRAVA, GRAVEGA!!!

La "Laborista Esperanto-Grupo" de Genova (Italio), nepovante respondi al ĉiu persono kiu petis senpage la libreton "Devoj de la Homo" de l'granda itala pensemulo Giuseppe Mazzini, por ŝpari monon ĉi—tie respondas al ĉiuj ke; oni ne povas daŭrigi la senpagan dissendado de la verketo pro la gravaj poŝtelspezoj, ĉar la monsumo malavare donacita por la eldono kaj dissendado de la 10,000 ekzempleroj pro la kreskanta, neantaŭvidita altigo de la poŝtafranko, precipe eksterlandan, elĉerpigis jam dum la ĝis nuna dissendado de la verketo.

La sume ricevita je monoferoj ĝis la 31-12-1925 estas je liroj 6112 kaj la elspezo (nur por la "Devoj de la Homo") ĝis la sama dato pro la 10,000 ekzemplera eldono kaj pro la jam disdonitaj 7600 ekz; estas je liroj 1973. Do oni povas konstati ke la "Laborista Esperanto-Grupo" pro tiu disdonados havas malprofiton je 1860 liroj.

Pro tio la "L.E.G." por ekvilibrigi sian bilancon dissendos la restantajn 2400 ekz: nur al tiuj personoj aŭ Esp. Societoj kiuj ilin petante sendos po almenaŭ lirojn 1,50 je monofero.

Tiu kiu deziras ricevi la libreton ne atendu elĉerpigon kaj sendu tiuj monoferojn al S-ro Managlia Ettore (Laborista Esperanto-Grupo) en Casella Postale 922 Genova (Italio).

GAZETOJ RICEVITAJ.

Administracioj bonvole sendu siajn ĵurnaloj laŭ tiu ĉi adreso—"La Suda Krucio," Box 731f, P. O. Elizabeth St., Melbourne, Australia:—Amerika Esperantisto, 3, 4; Amikeco, 1; Abeider Esperantisten, 1; British Esperantist, 250; Bulgara Esperantisto, 3, 4, 5; Belga Esperantisto, 10-11, 12, 1, 2; Bulteno Antverpena, 12; Esperanto (Romana), 305, 306; Esperantista Ĝejunalaro, 1, 2, 3; Herald de Esperanto, 99 ĝis 11-12; Hungara Esperantisto, 1, 2; Itala Esperanta Revuo, 1; International Language, 12, 1; Internacia Medicina Revuo, nova serio 1; Internacia Esperanto-Servo, 1; La Verda Lumo, 1; La Nova Tago, 4; La Suno Hispana, 103, 104; Le Monde Esperantiste, 6; Litova Stelo, 1-2; La Ridanta Esperantisto, 4; Libera Laboristo, 3; La Revuo Orienta, 11, 12; La Socialisto, 1; La Progreso, 10, 1; Munkas kultura, jan; Novaj Tempoj, 8-9, 10, 11-12; Nova Sento, 1; Oomoto Internacia, 1, 2; Portugal-Esperanto, 1;

Revista del Ateneo, 17, 18; Vegetarismo, 19, 20, 23.

NEKROLOGO.

S'ro George Winter, ano de la "Sydney Esperanto Society" kaj direktoro de l'Esplorada Oficejo de la Ŝtata Laborista Konsilantaro, mortis post longa malsano la 7a. marto, je aĝo de 39 jaroj. Li venis el Nov-Zelando, sed laŭ nia kono estis senparenca. La societo perdis influan membron.

Melburna Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. W. Ballard; sekretario f-ino V. Cox. Poŝta adreso, Box 731f, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejo: Public Benefit Bootery Building, 5th Floor, 323-325 Bourke St., Melbourne. Vendrede vespere, je la oka horo.

Sydney Esperanto Society. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.45—10 p.m. ĉe "Rawson Chambers," Rawson Place (5a etaĝo, ĉambroj 580-583). Ĝuste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro F. V. Taylor; Sekretario: S-ro L. E. Pfahl, 150 George's River Road, Croydon Park, Sydney.

Hobarta Esperanta Grupo. Kunvenejo: Eaton-Bray-lernejo, Davey-str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt, Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejo kaj poŝta adreso, 37 Brunel St., East Malvern, merkrede vespere, je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Lernantoj kunvenas ĉe Perth Academy, 8 horo, merkrede; progresintoj, 277 Hay-str.; 8 horo lunde.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books.

FREE TO YOU.